# Jura Semajno

Semajna Bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Septembro: 4 2025

## FRANCA EKSPREZIDENTO KONDAMNITA AL MALLIBERO

Pasintan ĵaŭdon, tribunalo en la urbo Parizo (Francio) juĝis, ke Nikolas Sarkozy, eksa prezidento de Francio, kulpis pri krima konspiro, kiam li financis sian balotan kampanjon de la jaro 2007, per mono havigita de la tiama libia registaro de kolonelo Muamar Kadafi. Sarkozy ĵus estas kondamnita al 5 jaroj da mallibero, kiuj efektiviĝos post kelkaj semajnoj, eĉ se apelacio antaŭ supera kortumo estas prezentata.



Tamen, ne temas pri la unua kondamno kontraŭ Sarkozy. Tiel, post okupi prezidentan postenon en Francio inter la jaroj 2007 kaj 2012, li estis kondamnita pro koruptado, avantaĝigo kaj kontraŭ-leĝa financado de balotaj kampanioj. Pro ĉi ĉio, franca registaro eĉ nuligis lian nomumon kiel kavaliron de la Honora Legio. Sed ĝis nun, li neniam eniris en malliberejon, pro la fakto ke kontraŭ ĉiuj juĝoj li prezentis apelaciojn. Tamen, ĉi tio ja povas okazi post ĉi tiu lasta kondmano.

Post la jaro 1945 nur alia ŝtatestro en Francio, Jacques Chirac, estis kondamnita. Tio okazis en la jaro 2011, kiam li estis urbestro de la urbo Parizo. Laŭ prokuroroj, Sarkozy agadis kiel ĉefrolulo en intrigo starigita kun libiaj funkciuloj, kun la celo atingi monon por la prezidenta kampanjo

de la jaro 2007, pere de mon-sendoj de Libio en bankojn ĉe impostoparadizoj. Pere de ĉi tiuj operacioj Libio serĉis favorajn ekonomiajn akordojn, diplomatian agnoskon kaj nuligon de arest-ordono kontraŭ Abdullah Senoussi, bofrato de Kadafi, serĉita kiel respondeculo de atako al franca komerc-aviadilo en la jaro 1989, kiu provokis 171 viktimojn.

Ne nur Sarkozy estis nun juĝita, ankaŭ Claude Gueant kaj Brice Hortefeux, eksaj kunlaborantoj de la eksa franca prezidento, estis ĵus kondamnitaj, pro sia rolo dum la konversacioj kun Libio.

Respondo de Sarkozy post koni la verdikton estis: "*se ili deziras, ke mi dormu ĉe malliberejo, mi dormos ĉe malliberejo, tamen tion mi faros alt-kape*".

# *Vorto de la Semajno*

## DEKLARI

1. Oficiale, publike, formale sciigi.

*Li deklaris, ke li neniam kulpos al vi pri tiu ago.*

2. Solene aserti, ke iu estas tia aŭ tia.


*Plejmulto deklaris sin kontraŭ la propono.*

3. Parole aŭ skribe sciigi, kun la konscio, ke tiu sciigo kreas, aliigas aŭ nuligas rajtojn, devojn aŭ jurajn rilatojn.

*Mia najbarulo deklaris sian rajton planti altajn vegetaĵojn apud mia ĝardeno.*

4. Sciigi al la koncerna administracio, ke oni havas impostodevajn objektojn.

*Ne forgesu deklari botelon da viskio ĉe la dogano.*



**HELPU NIN** pliigi la nombron de juraj E-vortaroj.

Sur nia TTT-paĝo www.esperantojuro.org aperas 3 vortaroj "nacia lingvo-esperanto" pri juraj temoj. Ĉiu vortaro enhavas centojn da vortoj rilataj al juraj medio kaj profesio. Ĝis nun ni sukcesis aperigi vortarojn el la angla, hispana kaj portugala lingvoj. **Ĉu vi estas preta kunlabori kun ni per traduko el aliaj naciaj lingvoj?** Se vi deziras kunlabori per via nacia lingvo, bv. kontakti kun ni.

Dankon!

https://www.esperantojuro.org/jura-vortaro/juraj-vortaroj/


# *Internacia kalendaro*

**29-an de septembro**: *Internacia tago de la konscio pri disipado de nutraĵoj.*

**30-an de septembro**: *Internacia Tago de la tradukado.*

**1-an de oktobro**: *Oficiala Tago de Ĉina Popola Respubliko*
*Festo de la sendependiĝo de Nigerio.*





**2-an de oktobro**: *Internacia tago de la senperforto.*

**3-an de oktobro**: *Tago de la germana unuiĝo.*
*Tago de la sendependiĝo de Irako.*






**4-an de oktobro**: *Internacia tago de la bestoj.*

**5-an de oktobro**: *Internacia tago de la gazetaro.*

**jurista@esperanto.ac**

**Internacia Jurista Esperanto-Asocio * www.esperantojuro.org**